

*En tiu ĉi numero
Dans ce numéro*

Edito.....	1
Robert prezentas sin. Amikumu kaj vizito de Chuck Smith.....	2
Unua IJK en Afriko. Visioconférence avec des esperantistes togolais	3
La eksplodo de la fabriko AZF.....	4
Promotion. Internacia pikniko.....	5
Manuela prezentas sin. Vizito el Turkio.....	6
Rencontre de Figueres, impressions...	7
Agenda.....	8

« La Krokodil' » est le bulletin d'information du Centre Culturel Esperanto de Toulouse.

Avant leur parution dans ce bulletin, vous pouvez lire et commenter les articles du « Krokodil' » en ligne sur le Portail de l'Espéranto en Midi-Pyrénées.

Toutes les contributions, en français comme en espéranto, sont les bienvenues. Envoyez-nous vos articles et photos.

« La Krokodil' » est mis en page par des bénévoles avec le logiciel libre LibreOffice.



Visitez le portail

<http://esperanto-midipyrenees.org>

ESPERANTO-KULTUR-CENTRO
Centre Culturel Esperanto de Toulouse
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél : 05 81 34 72 37 - 06 31 80 40 07
E-mail : esperanto.toulouse@free.fr
Site : esperanto-midipyrenees.org

EDITO

L'année 2016 aura été bien remplie, le Nomad'kurso à Madagascar, la deuxième Semaine de l'espéranto à Toulouse, les stages à Arrout, les repas-tchatches, les forums... Les occasions de parler en espéranto ou de l'espéranto n'ont pas manqué.

Nous avons reçu la visite de plusieurs espérantophones étrangers, venus du Pakistan, du Daghestan, du Togo, du Japon, du Brésil..., et bien sûr depuis septembre et octobre nous accueillons dans l'association deux jeunes volontaires en service civique, Manuela, qui vient de Roumanie et Robert d'Irlande.



Visite au Château de Foix

Manuela, Robert et les autres bénévoles de l'association se mettent déjà au travail pour nous préparer un printemps 2017 riche en belles rencontres ! Fin mars, pendant la semaine de l'espéranto à Toulouse, nous aurons la visite entre autres de Chuck Smith et Duncan Charters, deux têtes d'affiche du mouvement espérantiste. Fin avril, le week-end du premier mai, nous organiserons à nouveau la Krokodila renkontiĝo à Arrout, qui accueillera des participants de plusieurs pays pour 3 jours d'ateliers, de balades, de débats dans le cadre idyllique des montagnes ariégeoises.

Avec bien sûr les stages à Arrout, les repas-tchatches, les forums... Les occasions de parler en espéranto ou de l'espéranto ne manqueront pas !

MARION

Robert prezentas sin

Saluton al ĉiuj! Mia nomo estas Robert kaj mi havas 24 jarojn. Mi venas de Galway, urbo en la okcidento de Irlando.

En universitato, mi studis ekonomikon kaj politikon en Dublino. Mi havas grandan intereson en tiuj temoj kaj ĉiam legas librojn pri ili. Fakte, mi amas legi kaj estas vere legemulo (mi legas 70 librojn jare). Mi ankaŭ ŝatas skribi, ĉefe blogerojn. Mi havas du blogojn, unu anglalingve (Whistling In The Wind) kaj la alia esperantelingve (Teo kaj Libroj). Mi tre ŝatas diskuti pri mondaj aferoj. Mia anglalingva blogo gajnis pli ol unu miliono da vidoj kaj mi komencas skribi por esperantaj gazetoj. Mi ankaŭ kreis kelkajn esperantajn filmetojn por montri Esperantujon al la mondo.

Mi komencis lerni Esperanton en 2014. Miaj amikoj ne komprenis kial mi volas lerni iun lingvon krom la angla! En la lando de blinduloj, la unuokululo estas rego, kaj en angleparolantaj landoj la dulingvano estas reĝo. Bonŝance, la angla estas mia denaska lingvo, sed ne estas juste se mi igus ĉiujn paroli mian lingvon kaj ne parolus unu vorton de ilia lingvo. Tial mi ŝatas la neŭtralecon de Esperanto. Mi ankaŭ estas mallingvemulo kaj malsukcesis lerni aliajn lingvojn (male al aliaj esperantistoj, Esperanto kaj mia denaska lingvo estas miaj solaj lingvoj). Mi eĉ estas Irlandano kiu ne parolas Irlande! La neregulaĵoj kaj komplikaĵoj vere ĝenas min do mi preferas pli simplan kaj logikan lingvon.

La laborsituacio en Irlando malbonas kaj vivo en malgranda insulo tede, do mi volas vojaĝi kaj vidi aliajn landojn, kulturojn kaj lingvojn. Mi tre ŝatas Esperantujon, kaj la lingvon kaj la homojn. Tial mi venis al Francio, por esperantumi, vidi alian landon (kie ne pluvas tiom ofte kiel en Irlando) kaj lerni la francan (kiun mi studis en lernejo sed mi ricevis grandan ŝokon kiam mi eltrovis ke francoj ne parolas kun la irlanda akĉento en kiu mi lernis). Ekde mia alveno, Francio aspektas tre bela.

Mi laboris unu jaron ĉe E@I en Slovakio. Mi loĝis en malgranda kaj trankvila urbo, la malo de Tuluzo! Mi tute vivis esperante, ni ĉiuj parolis esperante en la oficejo kaj ankaŭ hejme ĉar ni volontuloj loĝis kune. Fakte, mi uzis esperanton tiom multe ke mi ne lernis la slovakon ĉar mi ne bezonis ĝin! Mia nivelo de Esperanto multe pliboniĝis kaj mi trapasis la KER-ekzamenon dum UK je la C1 nivelo. Mi partoprenis multajn renkontiĝojn, kiel SES, JES, IJK, UK, IJS ktp. Esperantajn gazetojn kaj librojn mi tre ŝatas legi kaj aŭskulti muzikon.

Mi tre antaŭĝojas mian aventuron en Francio kaj esperas ke mi lernos kaj amuziĝos multe!

ROBERT

Amikumu kaj vizito de Chuck Smith en Tuluzo



Ĉi-jare aperis nova projekto kiu nomiĝas Amikumu, farita de famaj esperantistoj kiel Chuck Smith (kreinto de Vikipedio kaj Duolingo en esperanto), Richard Delamore (Evildea) kaj Judith Meyer (Polyglot Gathering). Ĝi estas senpaga apo por poŝtelefonoj kiu helpas homojn trovi aliajn esperantistojn. Ĝi montras mapon de la ĉirkaŭaĵoj kaj montras kie aliaj esperantistoj estas. Ĝi plifaciligas la trovadon de aliaj esperantistoj kiam oni nur mallonge vizitas iun urbon aŭ se tie ne ekzistas klubo. Ili esperas ke ĝi estos preta en marto 2017.

Ni havos la ŝancon akcepti Chuck Smith la 27an kaj la 28an de marto 2017 dum la Esperanto-semajno de Tuluzo!

ROBERT

La unua IJK en Afriko

Por la unua fojo, Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos en Afriko. La venonta IJK okazos en la urbo Anhno, en Togolando. Ĉi tiu estas tre grava momento en Esperantujo kaj helpas disvastigi la lingvon al nova kontinento. Ĝis nun, granda kongreso kiel UK aŭ IJK neniam okazis en Afriko, do ĉi tiu estos nova paŝo.

Por subteni la kongreson, TEJO organizas monkampanjon. Oni povas donaci interrete por okazigi la eventon kaj venigi homojn. TEJO ricevos 130 mil eŭrojn de Erasmus + se ĝi spezos 13 mil eŭrojn.

<https://www.generosity.com/community-fundraising/ni-realigu-la-unuan-ijk-n-en-afriko/>

ROBERT

Visioconférence avec des espérantistes togolais

La 19an de novembro, okazis internacia kunsido inter esperantistoj de Francio kaj Togolando. Kadre de la Semajno de la Internacia Solidareco, la kunsido strebis kunigi homojn de ambaŭ landoj kaj plibonigi la internaciajn rilatojn. Estis ŝanco renkonti kaj paroli kun homoj de tute alia lando kaj kulturo. Esperanto estis la komuna lingvo inter ambaŭ grupoj. La kunsido diskutis pri temoj kiel lingvo, kulturo, socio, aktivado kaj moderna vivo. Oni komparis malsamecojn inter Eŭropo kaj Afriko. Oni ankaŭ diskutis la planojn por la venonta Internacia Junulara Kongreso.



Le 19 novembre 2016, dans le cadre de la *Semaine de la Solidarité Internationale*, le Centre Culturel Espéranto proposait cette rencontre par Skype d'espérantistes togolais, membres de l'[APETO](#). Cette visioconférence s'est tenue d'une part car le fondateur et animateur de cette association, Adjé Adjévi, a été le premier espérantiste soutenu dans le cadre du programme de solidarité *Espéranto +*, et aussi parce que ces jeunes organiseront, en août 2017, le premier congrès mondial des jeunes espérantophones ([IJK](#)) en Afrique. Les échanges furent intéressants pour les Toulousains (trop peu nombreux) qui y participèrent, et nous avons appris qu'à Lomé, « presque tout le monde, et en tout cas tous les jeunes, sait ce qu'est l'espéranto ».

La eksplodo de la fabriko AZF

La 21-an de Septembro 2001, je 10h17, la fabriko AZF de Tuluzo, (AZ por « azote », t.e nitrogeno, kaj F por « fertilisants », sterkoj) eksplodegis, profunde markante la urbon.

La oficiala bilanco kalkulas 31 mortintojn, interalie 21 dungitojn en la fabriko kaj ĉirkaŭ 2500 vunditojn el kiuj tridekon kun gravaj vundoj. La plejparto de la viktimoj suferis rekte pro la blova efiko de la eksplodo aŭ nerekte pro objektoj disĵetitaj de la blovo, ĉefe vitrosplitoj. Sed ankaŭ miloj da personoj eksuferis pro psikaj malordoj (depresioj, angoroj, sendormeco) kaj ankaŭ pro aŭdaj problemoj. La bilanco povintus esti multe pli peza se la eksplodon ne rezistus proksimaj fosgenaj tubaroj.



Tiu fabriko situis 5 km de la centro de Tuluzo, ĉe la rivero Garono kaj la ĉirkaŭurba aŭtovojo. La eksplodego kaŭzis gravajn detruojn en la sudokcidenta parto de la urbo, ĉefe malriĉaj kvartaloj. La tuta fabriko disbloviĝis, nur turo kaj gardodometo plu staris. Proksime, 2 grandajn vendejojn la eksplodo tute detruis, same kiel 150 urbajn busojn en la ĉefa busparkejo de la urbo. Ĝi forte trafis multnombrajn konstruaĵojn, loĝejaĵojn, oficejaĵojn, sportohalojn, kulturajn lernejaĵojn kaj universitatajn ejojn, 2 grandajn liceojn kaj la urban psikan malsanulejon. Sed difektoj, rompitaĵoj montrofenestroj, fenditaj muroj videbladis ĝis la urbocentro. Oni taksis la damaĝojn entute je 2

miliardoj da eŭroj. La detonacion oni aŭdis pli ol 80 kilometrojn de la urbo kaj oni registris sismon grandan je 3,4 laŭ la Richter-skalo.

Anstataŭ la fabriko, tute forigita, nun staras memormonumento, malsanulejo kaj studcentro pri kancero. La videblaj vundoj de la urbo hodiaŭ malaperis sed la profundaj traŭmatoj ĉe multaj personoj daŭre restis. Ne helpas, ke, post jaroj da enketo, dekoj da raportoj, da konfliktoj inter viktimoj-asocioj, da konfuzigaj informoj, daŭre aspektas ne klare la detala disvolviĝo de la akcidento kaj la diversaj respondecoj. En 2006, iom post la sendo de fina raporto de ekspertoj, la juĝisto fermis la enketon kaj konkludis ke akcidenta mikso de materialoj kaŭzis la eksplodon, eksplodon de stoko de almenaŭ tricent tonoj de amonia nitrato.

La 24an de Septembro 2012, dek unu jarojn post la katastrofo, la juĝejo de Tuluzo kondamnis je senintenca homicido la firmaon, filion de la firmagrupa Total, posedanto de AZF, kaj la eksdirektoron. Sed duboj ĉe multaj persistas, aŭ oni persistigas ilin. Pro apelacio, nova plua juĝo denove okazos. Konsekvence, de 15 jaroj, multaj hipotezoj pli malpli ŝvebaj daŭre aperas en artikoloj kaj libroj kaj la firmao Total, ĉefa akuzito, kompreneble ne estas la lasta agadi por dubigi la homojn... Hipotezoj kiel la terorisma spuro, (kiu rapide aperis ĉar la eksplodo okazis nur 10 tagojn post la dek unua de septembro, la terorisma atako en Novjorko), aŭ elektraj arkoj aŭ kulpigo de najbara fabriko de AZF, kiu produktis benzinon por spacraketoj kaj havas sekretajn aktivadojn por la franca armeo.

Sed tiuj daŭraj polemikoj, demandoj ne forgesigu, ke AZF estis produktejo de kemiaj sterkoj, partoprenanta en la armea-industria komplekso kies danĝero kaj malbono transiras tiun katastrofon.

AZF, tri literoj kiuj parolas pri mortigeca mondo, kies konstruado ni partoprenas. Dek kvin jarojn poste, de la 19a ĝis la 26a de septembro 2016, la radiostacio Canal Sud organizas radiofonian eventon "[Quand votre ville fait Boum](#)" sed ne nur, en sia kanalo kaj en kelkaj lokoj de la urbo por repensi kio okazis, por esplori la ligojn kiuj kunigas industrion al terkultivado, armado kaj urbanismo.

Aŭskultu la registritan version de tiu artikolo kadre de [Esperanto-Magazino N°97](#) kaj raporton pri la evento « Quand votre ville fait boum » kadre de [Esperanto-Magazino N°102](#).

Promotion sur... Grand Dictionnaire Français-Espéranto

Jacques Le Puil, Jean-Pierre Danvy

Paris: France-Espéranto, 1992

939 pages, 20 cm

32 000 entrées et de nombreuses expressions. Le dictionnaire français-espéranto le plus complet.

Prix : 42.00 — EUR — TTC - promo : 15.00 EUR

Déstockage avant une prochaine réédition

Achetez sur la librairie en ligne du Centre Culturel Espéranto.

Plus d'infos (Marion) : 06.87.64.75.84 / esperanto.toulouse@free.fr



Internacia pikniko



Pique-nique au Jardin des plantes de Toulouse, 1er novembre 2016, à l'occasion de la visite du jeune espérantiste brésilien Guilherme Fians, qui fait son doctorat en France et en Angleterre sur le mouvement politique espérantiste. Guilherme nous a accompagnés aussi fin octobre à la Rencontre Internationaliste de Figueres. Il trouve intéressante et riche pour sa recherche la relation entre l'espéranto et les langues régionales, l'occitan et le catalan.

Manuela prezentas sin

Saluton, tuluzanaj geamikoj!

Mi nomiĝas Manuela kaj mi estas la nova volontulino de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo. Plezure malkovri la rozkoloran urbon kaj ĝian loĝantaron.

Mi devenas de Vaslui, eta urbo de la nordorienta parto de Rumanio. Tie, ni konsideras nin “insulo de latineco en slava maro” kaj ni fieras pri nia latina deveno!

Mi interesiĝas pri lingvoj de ĉiam. Mi studis la francan, la anglan, Latinon, la hispanan kaj la germanan, kaj freŝdate la portugalan kaj Esperanton.

Kiam mi estis infano mi ŝatis rigardi globuson kaj mapon kaj observi la plej ekzotajn landojn. La mondo ŝajnis tre granda kaj mi ne imagis ke mi iam vojaĝos kiel nun.

Mi finis tiujare internacian magistran programon de interkultura mediacio, kiu ebligis min studi kaj vojaĝi en Francio (en “Ŝti-lando”, pli ekzakte en Lillo), Belgio (Lovenjo) kaj Brazilo (Rio). Havante la lingvojn kiel pasion, mi pensis: kiel ligi ĝin al interkultura mediacio? Kaj jen kial mi fokusiĝis je la esperanta, pri kiu mi aŭdis kaj scivolemis ekde infanaĝo.

Tiusomere mi ankaŭ partoprenis UK-on en Nitro, kiel volontulino kadre de Eŭropa Volontula Servo.

Pri tiu nova tuluza esperanta sperto mi ankaŭ tre entuziasmiĝas kaj pretas komenci! Mi ŝategas lerni kaj lernigi, amikiĝi, interŝanĝi kun vi pri la plej diversaj fakoj kaj malkovri novajn horizontojn tra la Esperanta. Kien ni ekskursu, karuloj? Birdeto suflores al mi pri kataroj, belaj kanaloj, kaj iu kat-kafejo...? Mi senpacienas viziti Esperante!



MANUELA

Vizito el turkio

Table d'espéranto à la soirée linguistique de Cactus, avec notre ami turc Murat Ozdizdar. Professeur de



chimie et amateur de langues, Murat adore voyager, rencontrer des espérantistes et enseigner aussi l'espéranto en Turquie, dans son école. Il a participé à notre émission en direct sur Canal Sud ([Esperanto-Magazino N°96](#)), écoutez l'enregistrement sur notre site !

Le café des langues au Cactus a lieu tous les 2ème et 4ème mardis du mois.

Impressions sur la Rencontre internationaliste de Figueres

Le 28, 29 et 30 octobre s'est déroulée à Figueres la Rencontre internationaliste d'espéranto, organisée par l'Association catalane d'espéranto. Presque une dizaine d'espérantophones de la région avait fait le déplacement. Voici quelques impressions des participants :

Du 28 au 30 octobre j'ai participé au 12a Internaciisma Renkontigxo, à Figueres au nord de la Catalogne. Le lieu était bien choisi car, d'une part, Figueres présente un attrait géographique, historique et culturel (passage de la Retirada, Musée Dali entre autres) d'autre part c'est une petite ville et nous avons pu nous déplacer facilement à pied.



Ce type de rencontre d'une soixantaine de personnes est intéressant pour faciliter les échanges, ceci dit j'ai trouvé que le lieu de la rencontre était un peu vide. Il manquait une salle plus conviviale pour que les participants puissent s'asseoir, parler, rester davantage regroupés, pour les cours ou ateliers. Bien sûr beaucoup se sont retrouvés dans les nombreux cafés et restaurants du centre. La salle où se déroulaient les conférences était cependant très bien. Ayant aidé Floréal sur le stand de Vinilkosmo, je n'ai pas assisté à ces conférences dont les sujets paraissaient intéressants mais néanmoins assez pointus à mon avis. J'ai cependant pu participer à l'atelier de Christophe que j'ai particulièrement apprécié. Plusieurs participants sont venus sur le stand, soit pour découvrir ou écouter les productions musicales en espéranto ou pour d'autres nouveautés. Il y eut deux moments forts au centre ville le samedi. A midi, l'accueil à la mairie, où la mairesse a montré son soutien à la langue Espéranto et le soir, sur la jolie place du Théâtre Jardi, le concert de Jomo qui a bien animé la petite assemblée. Nous avons remarqué que plusieurs personnes extérieures se sont arrêtées et ont même dansé. J'ai participé plusieurs fois aux rencontres en Catalogne et j'ai toujours bien aimé l'ambiance et y trouve les gens très chaleureux. **Françoise**

J'ai eu une expérience très intéressante à cette rencontre, c'était ma première fois en Espagne. On m'a reproché tout de suite qu'on était en fait en Catalogne (les nombreux drapeaux dans les rues le montraient bien). Les Catalans sont très fiers, ils ne voulaient que parler en catalan sur la Catalogne ! (Mi havis tre interesan sperton ĉe la renkontiĝo kaj ĝi estis mia unua fojo en Hispanio. Oni tuj riproĉis min kaj diris ke mi fakte estis en Katalunio (la multaj flagoj tra la stratoj emfazis tiun). La katalunoj tre fieras, ili nur volis paroli katalune pri Katalunio!) **Robert**


J'ai aimé la rencontre parce que c'est la première fois que je visite la Catalogne et j'ai aimé connaître la région et les espérantistes d'ici. J'ai eu l'opportunité de participer aux conférences, de visiter la ville. En Catalogne, il y a beaucoup d'espérantistes qui utilisent l'espéranto pour parler de l'indépendance de la Catalogne et des questions politiques, ça m'intéresse beaucoup par rapport à ma recherche sur la relation entre les engagements des espérantistes avec des mouvements sociaux et des points de vue politiques. **Guilherme**

J'ai beaucoup aimé revoir les amis que j'ai connus au Congrès mondial en Slovaquie ou aux tables d'espéranto de Barcelone. Et voyager avec les espérantistes de Toulouse et jouer au loup-garou ! On a contribué aussi, la bande de toulousains, aux activités de la rencontre, avec le concert de Jomo, la présentation de Flo sur Vinilkosmo et Eurokka, l'atelier de Christophe sur la création des verbes, notre

présentation sur le volontariat en espéranto... Puis Figueres est une ville si formidable et chaleureuse, j'espère y revenir un jour ! **Manuela**

L'agenda du Kroko'

**Retrouvez l'agenda mis à jour sur notre site : esperanto.midipyrenees.org
Sauf indication contraire, pour toute demande de renseignement concernant l'agenda, merci de prendre contact avec Marion au 06.87.64.75.84 ou 05.81.34.72.37, ou bien en écrivant à esperanto.toulouse@free.fr**



JANVIER - JANUARIO 2017

Lundis 9, 16, 23, 30 janvier : Esperanto-Magazino
(En direct les 9 et 23 janvier)
de 20h à 21h sur canalsud.net ou 92.2Mhz à Toulouse

Mardi 10 janvier : Café des langues
Horaire : à partir de 19h30
Lieu : Toulouse, bar le Cactus

Mercredi, 18 janvier : Café des langues de Foix
Horaire : de 18h à 20h
Lieu : au Léo, à Foix, 16 rue Peyrevidal

Samedi 21 janvier : Stage pratique
Horaire : De 9h30 à 17h
Lieu : Maison de quartier Ranguel

Mardi 24 janvier : Café des langues
Horaire : à partir de 19h30
Lieu : Toulouse, bar le Cactus

FEVRIER - FEBRUARO 2017

Mercredis 1^{er} et 15 février : Café des langues de Foix
Horaire : de 18h à 20h
Lieu : au Léo, à Foix, 16 rue Peyrevidal

**Du 11 février au 18 février : 24-e Stage de Chant
Choral en espéranto**
Lieu : en Ariège

Mardi 7 et 21 février : Café des langues
Horaire : à partir de 19h30
Lieu : Toulouse, bar le Cactus

Lundis 20 et 27 février : Esperanto-Magazino
(En direct le 27 février)
de 20h à 21h sur canalsud.net ou 92.2Mhz à Toulouse

MARS - MARTO 2017

Du 21 mars au 31 mars : SemEo - Semaine de l'Espéranto 2017
Plusieurs lieux sur Toulouse
Ateliers, stands d'infos, concert, rencontres...
Rencontre avec Chuck Smith le mardi 28 mars.

Vendredi 24 mars : Réunion Projets régionaux
Horaire : A partir de 19h
Lieu : Gîte la Maraude 09800 Arrout, dans le Couserans

Weekend des 25 et 26 mars : Stage de printemps
Horaire : De 9h30 le samedi à 17h le dimanche
Lieu : Gîte la Maraude 09800 Arrout, dans le Couserans
3 niveaux : débutants, intermédiaires, conversation

PLUS TARD – PLI POSTE

Du 28 avril au 01 mai : Krokodila Renkontiĝo
3ème rencontre internationale du Crocodile, 4 jours
de débats, balades, ateliers...
Lieu : à Arrout, dans les Pyrénées

Dimanche 28 mai : Forum des langues du monde
Stand d'information géant sur l'espéranto
Horaire : 10h à 19h
Lieu : Toulouse, Place du Capitole

Vendredi 9 juin : Réunion Projets régionaux
Horaire : A partir de 19h
Lieu : Gîte la Maraude 09800 Arrout, dans le Couserans

Weekend des 10 et 11 juin : Stage d'été
Horaire : De 9h30 le samedi à 17h le dimanche
Lieu : Gîte la Maraude 09800 Arrout, dans le Couserans
3 niveaux : débutants, intermédiaires, conversation

Les 24 et 24 septembre : Alternatiba Toulouse
Informations et ateliers sur l'espéranto
« Changeons le système, pas le climat ! »